

PENSEO

N-ro 308

jun. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



totemo varmiga

simbolo kun flama signifo
alflugas al mi en atendo de nifo.
karisme ĝin sondas mi, suĉas...
la vojo, ho lakta, du sunojn ge-kluĉas.



2013.12.30

arketipo

sekunda fiasko dumvivan koŝmaron obsedas.
ĉu ĉiuj aliaj iradas buterajn vojegojn?
envio, perdsento neniam ne drivas plafone.
senbranĉa kubaĵo sinrule postkuras kolegojn.

2013.12.25

medio de feoj

pere de febro kvardekgrada,
ni nun rezistas kontraŭ frosto sub la nulo.
stomako restas ŝvele sata;
riĉas ĝuiloj mame nutraj en nebulo.



2013.12.24

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Aŭtuno

Majo glitas en aŭtuno,
kiel milda melodio ...
Mia koro tiam revas,
ke per pensado ĝi sentas
la poezion de l' vivo.

Juiz de fora, 06/05/2017



La blua majosuno
la sekreton ne malkaŝas
de l' arboj ĉe plac', kiuj
ĉirkaŭbrake interparolas
per silento amema.

Sed elmontras scienco
pulsadon de l' radikoj
per reto tre mirinda:
la "interreto natura",
kiu l' arbojn konektas.

Juiz de Fora, 13/05/2017

Paŭlo Silas (Brazilo)



POEMO KUN KUGLOJ

Kian poemon esperantisto povas verki en ĉi
tiu kvartalo?
Flugas super niaj kapoj po unu kuglo por ĉiu
vorto.
La leganto ankoraŭ ne mortis, ĉar la vivo estas

bonkora.
 Mi ne estos poeto kiu prikantas aliajn landojn.
 Ĉu mi citos ĉi tiun landon?
 Brazilo estas abstraktaĵo.
 Miaj poemoj dancu laŭ la ritmo de revolveroj.
 Mi neniam tuŝis revolveron,
 sed mi vidis korpon sternitan sur stratopolvo,
 murdita probable per revolvero.
 Mi preterpasis sen demandi, kion la ulo faris
 dum vivo.
 Braziloj ene de la oficiala Brazilo.
 Multaj aliaj landoj ene de ĉi tiu lando.
 Brazilo estas mortigmaŝino.
 La antaŭhieraŭa mortigo,
 du domblokojn for de kie mi legis revuon,
 alvenis ĝis mi kiel banala novaĵo.
 Oni mortigis alian.
 – Mi aŭdis la pafojn – mi diris apatie.



la 9-an de majo 2017

Mori (Usono)



Aforism-e(20)

Riĉa sed malgaja
 homarano,
 estas kiel soifa ulo
 en oceano.

Suno,
 luno
 kaj vero
 ne kaŝeblas
 sub tero.

En tiu ĉi epoko
 la plej ĉefa problemo

estas tio ke homo
 ne kondutas kiel homo.

Ne ekzistas infero
 krom mizero
 sur la tero.

Lupo vivas
 kiel lupo
 kaj tio ne estas kulpo,
 sed estas kulpo granda
 Vivi kiel sovaĝa
 lupo.

En pseŭdodemokratio
 homoj pro manko de politika
 saĝo
 propravole vivas
 en la tutlanda kaĝo.

Homojn kun saĝo
 kaj kuraĝo
 ne eblas longe
 teni en kaĝo.

Por esti granda persono
 Necesas leona sinteno.

Grandeco de la homo granda
 kuŝas en la homa karaktero
 kaj koro,
 kaj en la posteno
 nek en la laboro

La vivo de ĵaluzuloj
 pli mizeroplenas
 ol tiu de almozuloj.

La diferenco inter
 bonaj kaj malbonaj personoj
 estas kiel diferenco
 inter hienoj kaj leonoj.

Amiko

kies amikeco
estas nur politiko,
tiel fidindas kiel
malamiko.

Leono
ne estus leono
se ĝi vivus kiel lupo
aŭ vulpo
aŭ hieno.
Leono estas leono
pro la plej alta,
leona sinteno.

Se ne eblas vivi
kiel leono,
eblas ne vivi
samkiel hieno.

Dio
kiu ne respondas
vian peton,
ne meritas
vian atenton.

La plej terura hieno
estas homo
kiu ruinigas la vivon de aliuloj
por esti riĉa persono.

Oni ferminte
siajn okulojn
ne povas forviŝi
siajn makulojn.

Estas la paŝtista kulpo
se inter ŝafoj
troviĝas lupoj.

Birdo ĉe kiu manĝaĵo
pli gravas ol liber'
baldaŭ trovas sin
en la kaĝo.


Prizonoj de kulturoj
Pli fortikas ol tiuj
kun grandegaj muroj.

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



La najlo

(por karikaturo de Tom Ungerer)



Mi restos ĉe vi.
Vi restos ĉe mi.
Por tio estas garanti'!

Gis la morto nin disigos,
fera najlo nin kunligos.

Vi restos ĉe mi,
mi restos ĉe vi.
Ĝi ĉiam estos tiel ĉi.

Gis la morto nin disigos,
tiu najlo nin kunligos!

Feministino

(por karikaturo de Tom Ungerer)



La edzo manĝas
kun la hundo
laŭ la kutim'
de ĉiu lundo.

L' edzino fumas,
televidas,

ŝin nur je
inoforto fidas.

Mozarto

(por karikaturo de Tom Ungerer)



“Ek! Startu!
Laŭ-Mozartu!
Surpostpartu!
Por ke mi foje
bone fartu!”

“Mozarto
tiel ne donas
bonfarton;
male fi-arton
kaj vunditan
postparton!”

Cirkonstancoj

(por karikaturo de Tom Ungerer)



Inter lupoj estu lupo,
ne provu esti ŝafo
en la trupo.

Inter homoj estu homo,
ne provu esti lupo
en homdomo.

Wally Du Temple (Kanado)



La Karoto


Ĉu ni punu seksvoremajn la karotojn
Kiu fikas arde teron sen permesojn
Firme, rigide, per daŭraj plonĝaj agoj
Dum ĉiaj la someraj varmegaj tagoj
Ili emas terpatrinon plezurigi
Neniam pensas reagon pridemandi.
Ĉu ni boris bone? Ĉu ni faru plie?
La Terpatrinon homoj perfortas scie.
Senkulpa karoto laŭnaturas pie.

Atendo Por Maristo

Marrefluoj dum miljaroj
konturis ŝtorme, plaŭde
ŝtonajn trajtojn sur la klifojn
facetis krutapike.

Marondoj dum sola horo
skizis granitan mienon
Al molsulka invizaĝo
Gravuris fortakve ŝajnon

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



FLUGPOLITIKOJ

sperto freneza kap-turne vekigi
marŝi iomete konfuze
dekstren la falo
refoje skandalo,
maldekstraj karuloj: “ĉu sen enkonduko?!”
skuo skandalo!

ve! maldekstruloj dekstruloj
ankaŭ vekigigas kaj marŝas stumple
maldekstren la falo
refoje skandalo

apenaŭ ĉe kolomboj dialogon mi provas,
forflugas ambaŭ. (pikilon mi ĵetas:
“vi flugu mi petas per unu flugil’!”)

jam hejme hirundojn mi vidas
 multope flugante – per ambaŭ flugiloj!
 sendube frustrante: “bezonatas navigi
 ĉiun direkten alteriĝan klapon estigi
 direkton min donas – meditu, stultulo!”

Ivanichka Madgharova (Bulgario)



Cirapolo da hajkoj

Surdiĝinta gutstri’.
 La hirundoj forflugas.
 Kantas vinbarel’.



Amantaj treloj –
 en branĉoj brava paser’.
 Falinta nesto.



Arbo soleca –
 ido de la naturo.
 Migrulo laca.



Knabo glutadas
 amarlarmojn pro taskoj.
 Sur ludejo pilk’.

Du Fu (712-770)



*printempa
 vidaĵo*

Nur montoj kaj riveroj restas je ruinaĵo
 Printempe la urbo estas plena de densa
 herbaro

Tiam miaj larmoj verŝiĝas ja en florojn
 Kiel tristaj estas la disiĝo kaj birda kanto
 Tiu milito daŭras ankoraŭ tri monatojn
 Letero el mia familio valoras mil dukatojn
 Ve! miaj blankharoj pli mallongiĝis ol antaŭo
 Pinglio de premio ne plu povas fiksiĝi je la
 haroj

Esperantigis



Takashi Ito (Japanujo)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKUNUA

Lasu fari kaj toleru

§11-03

Cui Ju demandis Laŭzi:

“Kiel do oni povus plibonigi la menson de la popolo, se neniu regus super la mondo?”

“Gardu vin de perturbo de ilia menso,” respondis Laŭzi. “Ili deprimiĝas tiam, kiam ilia menso estas subpremata, kaj ekzaltiĝas tiam, kiam ĝi estas stimilita. Deprimita, ĝi fariĝas kvazaŭ malliberulo; stimilita, ĝi fariĝas kvazaŭ strangolato. La moleco kaj la malforteco povas venki la malmolecon kaj fortecon. Kiam ĝi estas submetata al aliformado aŭ remodelado, ĝi fariĝas varma kiel fajro aŭ malvarma kiel glacio. Ĝi ŝanĝiĝas tiel rapide, ke oni povas trovi sin jam en tute malsama mondo en palpebruma daŭro. Ĝi estas tiel profunda kaj kvieta kiel abismo tiam, kiam ĝi estas en ripozo, kaj ĝi estas tiel malproksima kaj mistera kiel la ĉielo tiam, kiam ĝi estas en moviĝado. Jen kia estas la homa menso, kiu estas tiel ŝanĝiĝema kaj tiel neregebla.

“En la antikveco, post kiam la Flava Imperiestro komencis perturbi la menson de la homoj per la humaneco kaj la justeco, la reĝo Yao kaj la reĝo Shun tiel multe lacigis sin, ke liaj femuroj osteciĝis kaj liaj kruroj eĉ tute senhariĝis, por nutri la korpojn de la popolo, faradis al si zorgojn por praktiki la humanecon kaj la justecon, kaj plenenergie klopodadis por starigi la leĝojn kaj la regularojn, kaj tamen ĉiuj ĉi tiuj penadoj vanis. La reĝo Yao do ekzilis Huan Dou al la monto Chong, la tri princojn de

Miao al la monto Sanwei, kaj Gonggong al la norda regiono Youdu. Ĉu tio ĉi ne estas la pruvo, ke ili ne rikoltis sukceson en la regado per la humaneco kaj la justeco?

“Kiam alvenis la epoko de la tri dinastioj Xia, Shang kaj Zhou, la mondo estis ĵetita en grandan panikon. Sur la plej malalta nivelo estis tiaj personoj, kiaj estis la reĝo Jie de la Xia kaj la rabisto Zhi, sur la plej alta estis tiaj personoj, kiaj estis Zeng Can kaj Shi Qiu, kaj fine leviĝis la debato inter la konfuceanoj kaj la moistoj. Sekve estiĝis duboj pri la ĝojo kaj kolero, trompoj inter la saĝuloj kaj la malsaĝuloj, riproĉoj inter la bonuloj kaj malbonuloj, moko inter la falsemuloj kaj la veremuloj, kaj tiel la tuta mondo dekadenciĝis. Ĉar ekzistas malsamaj kompreno pri tio, kio estas konsiderata kiel grandaj virtoj, la denaska naturo de la popolo falis en disiĝon. Ĉar ĉiuj homoj ĉasas sciojn, ili implikiĝas en diversajn disputojn. Rezulte de tio, hakiloj kaj segiloj estas uzataj por ilin puni, leĝoj kaj reguloj estas uzataj por ilin bridati, marteloj kaj ĉiziloj estas uzataj por ilin mortigi. La mondo sekve estas ĵetita en grandan konfuzon. La sola kaŭzo estas, ke la popola menso estas perturbita. La saĝuloj vivas ermitan vivon sur la montoj, dum la potencaj regantoj vivas maltrankvilan vivon en la palacoj.

“En la nuna tempo la kadavroj de buĉitoj amasiĝas unuj sur aliaj, la katenitaj malliberuloj defilas sin puŝante reciproke, kaj la torturataj viktimoj vidiĝas tie kaj ĉi tie. Dume la konfuceanoj kaj moistoj faras sian disputadon eĉ inter la katenitaj homoj. Ve! Ili ja troas! Ilia senhonteco kaj impertinento jam atingis la ekstrecon! Ĉu la saĝeco kaj la sciado ne estas la punjugo? Ĉu la humaneco kaj la justeco ne estas katenoj? Kaj ĉu Zeng Can kaj Shi Qiu ne estas la antaŭirantoj de la reĝo Jie de la Xia kaj la rabisto Zhi? Mi vere ne scias! Tial, kiel diras proverbo: “Eliminu la saĝecon kaj forĵetu la sciojn, kaj la mondo retrovos la ordon.”

§11-04

La Flava Imperiestro sidis sur la trono dek naŭ jarojn kaj la tuta mondo estis submetita al lia regado. Iutage, kiam li aŭdis, ke Majstro Guangcheng vivis sur la monto Kongtong, li iris vidi lin. La Flava

Imperiestro diris:

“Mi aŭdis, ke vi jam atingis la perfektan Taŭon. Ĉu mi povus vin demandi pri la esenco de la perfekta Taŭo? Mi volus utiligi la esencon de la ĉielo kaj la tero por helpi la kreskadon de grenoj kaj nutri la popolon. Mi volus ankaŭ regi la interagojn inter la jino kaj la jango, por ke mi adaptu min al ĉiuj estaĵoj en la mondo. Kion do mi faru, Majstro?”

Majstro Guangcheng respondis: “Tio, kion vi volas scii, estas ĝuste la substanco de la estaĵoj. Sed tio, super kio vi volas regi, estas iliaj restaĵoj post la detruo. De kiam vi ekregis super la mondo, ekfalas pluvo antaŭ ol la nuboj amasiĝas en la ĉielo, velkas la herboj kaj arboj antaŭ ol ili flaviĝas, kaj la brilo de la suno kaj luno pli kaj pli malheliĝas kun la tagoj. Kiel do mi povus diskuti pri la Taŭo kun persono de mallarĝa spirito kiel vi!”

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn la Flava Imperiestro retiriĝis kaj forlasis la regadon. Li konstruigis al si izolitan kabanon meblitan nur per mato el blanka pajlo. Loĝinte tie tri monatojn, li ree iris vidi la majstron.

Majstro Guangcheng kuŝis sur la lito kun la kapo al la sudo. Tre humile la Flava Imperiestro alproksimiĝis al li paŝante sur la genuoj, dufoje riverencis kaj respektoplene koŭtoŭis al li antaŭ ol demandi:

“Mi aŭdis, ke vi jam atingis la perfektan Taŭon. Ĉu mi povus vin demandi, kiel mi min kulturos, por ke mi povu vivi longan vivon?”

“Bona estas via demando!” diris Majstro Guangcheng abrupte leviĝinte. “Pliproksimiĝu kaj mi diros al vi pri la perfekta Taŭo. La esenco de la perfekta Taŭo estas profunda kaj obskura, kaj ĝia kulmino estas malhela kaj silenta. Ne aŭskultu, nek rigardu! Tenu vian spiriton en kvieteco, kaj via korpo estos en perfekta ordo. Estu silenta kaj kvietata, ne lacigu vian korpon, nek malŝparu vian energion, kaj vi povos vivi longan vivon. Se vi aŭdos nenion per viaj oreloj, vidos nenion per viaj okuloj, kaj scios nenion per via menso, tiam via energio vigligos vian korpon kaj via korpo vivos longatempe. Gardu vin, ke vi pensu pri nenio kaj perceptu nenion ekster vi, ĉar multe da scioj ruinigos vian korpon. Mi alvenigos vin al la brila plejsupro, la origino kaj fonto de la perfekta

jango; mi kondukos vin tra la pordo de la nemezurebla mallumo al la origino kaj fonto de la perfekta jino. La ĉielo kaj la tero havas ĉiu siajn funkcojn; la jino kaj la jango havas ĉiu sian provizejon. Se vi estos sufiĉe singarda konservi vin mem, ĉio en la mondo nature disvolviĝos. Ĉar mi alkraciĝas al la Taŭo kaj vivas en harmonio, mi kulturis min jam mil ducent jarojn sen ke mia korpo kadukiĝus.”

La Flava Imperiestro denove riverencis kaj koŭtoŭis al li dirante:

“Vi jam identigas vin kun la Ĉielo!”

“Pliproksimiĝu kaj mi diros al vi ion pli,” diris Majstro Guangcheng. “La perfekta Taŭo estas eterna, sed oni pensas, ke ĝi havas finon. Ĝi estas nesondebla, sed oni pensas, ke ĝi havas limojn. Tiuj, kiuj atingis la Taŭon, kiun mi ĵus menciis, povas fariĝi la imperiestro aŭ la reĝo; tiuj, kiuj ne sukcesis atingi la Taŭon, kiun

mi ĵus menciis, povas vidi la lumon de la ĉielo dum la vivo sed refariĝi bulo da tero post la morto. Ĉiuj estaĵoj en la mondo venas el la tero kaj revenas al la tero. Tial mi forlasos vin kaj iros tra la pordo al la eterneco, por vagadi en la lando de senlimeco. Mi partoprenos en la lumo de la suno kaj la luno kaj vivos tiel longe kiel la ĉielo kaj la tero. Se oni venos min vidi, mi tion ne scios; se oni foriros de mi, mi tion ne atentos. Ĉiuj homoj estas mortemaj, nur mi sola min transvivos.”

Elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



*Lunbrilo kaj
akvobrilo*

el rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Anoncist’
sur la reĝa tur’
en vintra tago kriis:
“Aŭskultu vi ĉiuj! Nur
tiu, kiu sur

urbomur’
tranokti nude
povos, ricevos de reĝ’
la filinon inklude
landparton tute.”

Afanti
pensis ĉe tio:

indas blagi al la reĝ’,
kiu al la nacio
ruzas sen pio.

Li iris
do al la palac’
kaj diris al la reĝo:
“Via moŝto, kun aŭdac’,
falu via grac’

jen sur min.
Mi volas vere
tranokti sur l’ urbmuŝo
por promeson espere
gajni fiere.”

La reĝo
jen ordonis tuj
depreni lian veston
loki lin sur urbomur’
por nokti en nud’.

Li certis,
ke tiu kreten’
mortos pro nokta frostoj,
ĉar mordos ĉe nokta ven’

lin venta siren’.

Afanti
petis ekkrie:
“Ordonu meti ŝtonon
egan en preto tie
por uzo plie.

La reĝo
miris pri l’ peto:
“Kial tiel, kreteno?
Simpla estas ŝtonmeto
kaj tuj en preto.”

Respondis
Afanti ruze:
“Estas mia sekreto.
Mi agos tute furze,
se vi rifuze.”

La reĝo
vole nevole
preparis ĉion por li
kaj traktis lin malmole,
eĉ ĝis strangole.

En nokto regis malvarmo, tamen Afanti staris aplombe jen en kalmo kontraŭ frost-svarmo.	Li fakte ne 'stis sincera. Nur distriĝi li volis, ne prenis tion vera, promes-ofera.	Troviĝis puto ĉe kaban', kie Afanti loĝis. Jen la reĝo kaj kompan' rajdis kun elan'
Ekrulis la ŝtonegon li tien kaj reen ade penante kun energi' kaj kun laŭta kri'	Post tempet' li ĉuis false "Ĉu vi vidis la lunon?" "Kial ne? Kiel farse kaj embarase!"	al kaban' kaj kriis sone, "Kie estas la mastro? Gastoj venas impone! Kondu tu bone!"
"Varmege! Varmege! Ho fu!" Afanti laŭte kriis. Aŭdis ĝin la reĝ' kun ĝu' tra la mura tru'.	La reĝo ŝajne en koler' kriis, "Vi varmigi vin per lunbril' por vivesper' kontraŭ frostsufer'.	Afanti eliris ride, "Kiel mi povas helpi?" "Donu akvon rapide kaj senhezite!"
Je aŭror' Afanti fine surmetis sian veston, iris al reĝ' proksime, petis obstine:	Vi trompul' kun malbona kor' staras kontraŭ l' kondiĉoj, nigrigas vin per malglor'!	"Momenton!" Afanti diris, "Akvon mi alportos tuj!" Al la puto li iris kaj jen deŝiris
"Via moŝt', mi tranoktis jam senveste sur la muro kaj vi devas laŭ l' proklam' doni ĉiel ajn	Afanti, vi for!" Afanti, tre, tre kolere forlasis la palacon. Li ekloĝis prefere foren libere.	la ŝnuron de la sitelo kaj kaŝis ĝin sub sablon, sidiĝis en kvieto kvazaŭ asketo.
filinon vian kaj parton de land' al mi laŭ promes'. Nu, ne uzu ruzarton nek eskap-salton."	Post tempdaŭr' la reĝo ĉasis tutan tagon en kampar', kabanon preterpasis sed ne forlasis,	La reĝo post longa atend' ordonis subulon lin serĉi pro senĉesa plend' pri lia ofend'.
La reĝo sin tenis muta por ruze elturniĝi per rimedo altruda kaj vere kruda.	ĉar kohort' lia en sufer' soifa serĉis akvon sub sunbakanta ĉiel' de varma somer'.	La subul' baldaŭ revenis kaj raportis, "Afanti humiligi vin penis kaj eĉ malbenis.

Li diris,
‘Li, stulta azen’,
mem venu al la puto!
Kia absurda kreten’,
tiu arleken’!”

Al la put’
li devigite
iris kun la subuloj
paŝante malrapide
kaj korp-rigide.

Ĉe l’ puto
li kriis boje,
“Kreteno, kie akvo?”
Afanti diris ĝoje,
“Jen vidu foje

en puton!”
La reĝ’ rigardis
en la puton kaj muĝis
al li kolero-ardis
kaj ade saltis.

“Kreteno,
kiel mi povas
trinki sen sitelŝnuro?
Kion mavan vi kovas?
Kion vi provas?”


Afanti
diris en trankvil’
“Jen vin sensoifigu
ne per akvo, sed
akv-bril’
laŭ via dezir’!”

La reĝo
kriaĉis gale,
“Ĉu sensoifigi min
povas akv-bril’ reale
aŭ trompi male?”

Afanti
diris sincere,
“Kiel akv-brilo ne vin
sensoifigas vere,
ankaŭ modere

la lunbril’
ne povas iom
varmigi ja en nokto
frosta la korpon de
hom’,
ho, ho, neniom!”

Gajo (Ĉinujo)



—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Oldiĝo
iom post iom
forronĝas nian
vivon
kiel vermoj voras
ĉiom,
ĝis fin’, neniom!

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan):
ĉina fikforma poemo el kvin
versoj de 35,77,5 silaboj laŭ
rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Adil Olluri



La portanto de la forpelitaj animoj

La patrino tenis forte mian manon, kiel neniam antaŭe kaj mi, kiu neniam volis ke ŝi kaptu min tie, ĉifoje eksentis varmon pro manpremo. Ŝia blanka mano kovris kaj igis nevideblaj miajn delikatajn fingrojn. Mi sentadis la tremetojn de vejnoj de ŝia maldekstra mano, alvenintaj el la profundo de tiu koro, kiu volis nenion alian, krom forigi sian infanon disde Prishtina^[1]. Ĉi tiu enlarmiĝinta urbo rigardadis nin ĉiujn, unu po unu, dum ni forlasis ĝin, ne pro malamo aŭ ĉar ĝi ne plu volis teni nin en siaj brakoj. Ne, ne la unua, nek la dua estis la kialo. Sed ni, kvazaŭ intertraktiĝis ke ĝi ne plu vidu niajn suferatojn kaj ne plu travivu la timon kiu igis nin sentiĝi kvazaŭ febraj

ĉi tiujn du lastajn semajnojn, kaj nek ni vidu ĝin mortante viva, nian karan urbon, kiu estis vidinta nin irante, ludante kaj kurante tra la ties stratoj, kiel kaŝeme ni rigardadis la geamantojn interkisiĝante ĉe stratangulo aŭ loĝejenirejo.

La urbo estis la sola atestanto de multaj kozoj okazintaj al mi kaj al miaj amikoj, kiuj apenaŭ vidiĝis aŭ kompreniĝis de iu alia homo.. Tial, la fakto de nia foriro igis min, dum kelkaj momemtoj, perdiĝi en rememoraĝoj kaj pensadi pri la faritaĵoj kaj revitaĵoj en ĉi tiu urbo, kvazaŭ ni neniam plu revenus ĉi tie.

La patrino tenis per sia maldekstra mano mian dekstran manon, dum per la dekstra mano tenis nigran teknon, plej grandan kaj plej larĝan el tiuj de ŝi posedataj, dum la ceterajn pli malgrandajn tekojn ŝi estis lasinta en nia loĝejo el tri ĉambroj, kie ŝi kaj la patro, hieraŭan vesperon, je 10-05 decidis ke la morgaŭon ni forlasu definitive ĝin. Dum longaj kvar

tagoj ili hezitis foriri simile kiel la aliaj, sed aŭdinte ke la policistoj estis forbatintaj unu el la amikoj de la patro, profesoron Hilmi, ili, senprokraste sin pretigis, por ke la morgaŭon, tuj post la krepusko de nova tago, ni tuj foriru kiel ĉiuj niaj najbaroj.

La patrino, tiun aprilan nokton, elprenis de sub la lito du grandajn ruĝetajn valizojn, kiujn ŝi apenaŭ estis lokŝanginta dum longaj jaroj, kaj en ilin ŝi enmetis niajn vestojn, premante ilin kaj ŝovante ilin ju pli profunden, por ke ili entenu des pli da kozo, kunprenendaj la morgaŭon. Unue, ŝi enmetis miajn vestojn, poste tiujn de la patro kaj laste la siajn. Dum ĉi tiu momenteto mi rimarkis ke ŝi unufoje rompis la vicordon, kiu fariĝis natura en la nia familio, ĉar kionfoje ni entreprenis vojaĝon, la patrino unue enmetis la kozojn de la patro.

Dum ŝi faris tion, la patro alproksimiĝis al sia biblioteko, kiu neniam estis malgranda kaj komencis rigardadi siajn librojn, tuŝadis ilin kaj rapide trafoliumis ilin, kvazaŭ li volus adiaŭi al ĉiuj ili laŭorde kaj pardonpeti ke, senvole, li devus forlasi ilin. Ŝajnis al mi ke, tiujn momentetojn, li interbabilis kaj dividis la zorgojn kun siaj libroj, kvazaŭ ili estus liaj plej proksimaj amikoj aŭ liaj plej fidelaj soldatoj, kiujn ĉi tiu, kiel ilia superulo, venis la nerenversebla historia momento perfidi ilin je plej senkompata maniero.

Ni eliris el la loĝejo la fruan matenon de la morgaŭa tago, kiu estis malferminta sian kurtenegon per malpeza pluvo, kiu sufiĉis ke nian foriran vojon igu pli malvarma. Irinte malsupren tra la ŝtuparo, en ĉiu etaĝo, la patrino kaj la patro ŝajnis min ke ili malrapidigis la paŝon, ju pli malsupren irante, des pli senbruaĵi iĝis iliaj paŝoj. Eble ili ne volis maltrankviligi la najbarojn, kiuj ankoraŭ povus esti endorme, malgraŭ ke la patrino, la hieraŭan vesperon, diris ke neniu el ili plurestis tie. Eble ili supozis ĉu reveni en la loĝejon aŭ daŭrigi la startitan vojon. Eble ili timis ke la paŝobruo povus ĝeni la verdĉapulojn, kiuj poste povus puni nin pro manko de bonkonduteco. La patro estis ŝarĝita per du grandaj valizoj, tiel kiel mi havis la konvinkon ke li malfacile ilin tenis, ĉar mi aŭdis liajn anhelojn. Tio okazis al li kionfoje li ege laciĝis farante iun laboron. Tiujn momentetojn li ege

silentis, kvankam mi tutan tempon rigardis al li kaj atendis iun vorton li eldiri. Almenaŭ li dirus kiam ekveturos la trajno kaj en kiu trajnoparto ni eksidos, ĉu meze, antaŭe aŭ malantaŭe. Intrigis min ege tiu ĉi pertrajna vojaĝo, ĉar tio estis ja la unua fojo por mi. Sed mi ne povis aldiri ilin ke mi ŝatas entrainiĝi, ĉar mi sentis tion kvazaŭ promenadon.

Ĉio ŝajnis trista, malvarma kaj senvoĉa, neniu kisis min survange, nek karesis mian hararon. Simple, nenio aspektis kiel en la pli fruaj niaj vojaĝoj. Estis tiu vojo embarasanta, timigis min ĉiu ties rando, ĉiu hundobojo kaj ĉiu policista krio en lia lingvo, kiun mi ofte aŭdis, sed neniufoje tio kortremis min kiel en tiuj horoj, kiam la vortoj de ĉi tiu lingvo igin min ekstremitate pro febro. La kriego de unu el ili senĉapela, ĉar ilin mi ne kutimis vidi sen ĝi, tre terurigis min, eĉ kovrante mian frunton per ŝvito. La patrino, kvazaŭ eksentinta tion, karesis mian hararon kaj miajn vangojn kaj ŝajnis min ke ŝi volus diri "ne timu, li nur mallaŭdas tiel envane, nenion malbonon faros nin", sed eble, pro timo al ĉi tiu kalva grandkapulo, ŝi ne kuraĝis aldiri min voĉe. Strange, la patro apenaŭ rimarkis la ŝviton sur mia frunto.

Li, kun plumbe pezaj valizoj, vidis ne maldekstren, nek dekstren, ĉar liaj okuloj sekvis unudirekten la vojon. Certe li volis ke ni atingu plej rapide la stacidomon kie estis la trajno, tiel multeparolata dum lastaj tagoj, kiu estis malplenigante la urbon. Ĉi tiu trajno ŝajnis al mi kvazaŭ bona fabela drako savanta la senkulpulojn de la senkompata monstro, alfrontanta sur la ties vojo, ŝtopanta la ties akvon kaj forglutanta iun ajn unue kaptita de ĝi.

La terura grandkapulo, kune kun siaj tri sveltaj amikoj, tenantaj iliajn aŭtomatikojn kun la pafiluboj supren, estis envicigantaj nin sur la maldekstra flanko de la vojo, tutsame kiel nia instruisto, kiam li enkondukis nin en la klasĉambron. Ili kondukis piedpiede ne nur nin, sed ankaŭ la ceterajn civitanojn, same survojiĝintaj. Ankaŭ ili estis ŝarĝitaj per valizoj, kun infanoj permane, kaj kelkaj el ili tenis perbrake ankaŭ maljunulojn kiuj malfacile iradis. Estis longa kaj regula vicordo, similanta al homrivero, de momenteto al momenteto pleniĝinta de stratetoj kaj enirejoj de la loĝejoj, kiuj ĉikaze similis al ties

branĉoj kaj torentoj. Mi havis la konvinkon ke ĉi tiu rivero neniam haltus pleniĝante, ĉar de sekundo al sekundo li fariĝis pli granda kaj pli larĝa. Neniu aŭdacis rompi la vicordon kaj dismeti la harmonion de tiu kolono, konstruita tiel mirinde, de tiuj kiuj nur mallaŭdis kaj alkriis nin, ĉar por tio la larĝskapula kalvulo severe punadis, kiel li faris al knabo ĉirkaŭ dudek jara, disigita ne pli ol kvin metrojn por helpi al povra maljunulino kiu apenaŭ povis moviĝi. Li disbatis lin per pugnoj kaj per la automatika pafilŝtipo li frapis al la malfeliĉa povrulo, kiu estis devigita trairi tutan vojon tiel sangumita kaj brovoŝirita. Ankaŭ kiam li lasis lin libera, la nia timiganto ne ĉesis mallaŭdante kaj ofendante la junulon, foje albane kaj foje en sia lingvo. Tiu vidaĵo kiu indus eĉ por la plej timegigaj filmoj, eniĝis la teruron en mian animon kaj igis min sentiĝi kvazaŭ en melilota sonĝo, de kiu la homo eĉ ne kuraĝas vekigi.

Tian travivaĵon havis mi tiutempe, ĉar mi ne kuraĝis eĉ plori kaj malŝarĝiĝi iomete de kortremoj, kiuj fariĝis ĉiam pli oftaj. Mi timis ne nur por mi mem, ne nur ke li povus frapi min, sed ankaŭ por ambaŭ gepatroj. La patro eble povus alfronti lin, povus redoni iun pugnon al li, dum la patrino neniel.

Ni alvenis ĉe la dezirata stacidomo kaj tie ni vidis la trajnon, kiu atendis nin malfermporde. Tiutempe, ĝi ŝajnis min la sola objekto kiu amis nin, kaj ju pli apude ni proksimiĝis, des pli kara ĝi fariĝis. Mi malpeziĝis iom kiam ni alvenis tie, ĉar ne plu kondukis nin la pugnanta kalvulo kaj siaj tri amikoj, sed estis tri aliaj policistoj, kiuj deekstere impresis tiel pli kvietaj.

Ĝis ni alproksimiĝis ne pli ol dek metrojn for de la adorita trajno, du policistoj haltigis la patron. Unu estis altstatura kaj portis okulvitrojn dum la alia estis mezstatura kaj aspektis pli maljuna, ĉar oni rimarkis ĉe li la grizajn lipharojn, kiuj igis nevidebla la supran ties lipon. Ili interparolis kelkajn minutojn kun mia patro, sed mi ne sciis kion ili diris, ĉar la patrino ne lasis min alproksimiĝi al la angulo de tiu vojo perŝtone pavimita. Post iome, li revenis kun pala vizaĝo kiel neniam antaŭe, kio estis traflaviginta la vizaĝon kaj aldiris nin ke ni devus ekiri tuj, dum li alvenis kun la sekvanta trajno. La vizaĝo de la patrino

morniĝis, larmetoj elgutis sur ĝin, kio tre rare okazis, dum mi rememoras ke mi estas dirinta kial ankaŭ ni atendu la alian trajnon, por ke ni ekiru triope kune. Li kisis pasie la patrinon, kion li neniam estis farinta je mia ĉeesto, dum ŝi apenaŭ ĉesigis la ploradon. Dumtempe, li ĉirkaŭbrakis min, kisis min surfrunte kaj manpremis min karese, dume mia mano ne volis disiĝi disde la lia. Mi klare rememoras, kvazaŭ okazis hieraŭ tiu disiĝo de la manoj kaj niaj fingroj, kiuj tiel malrapide disiĝis unu de la alia. La trajno ekiris. Mi vidis de la fenestro kiel oni enigis mian patron en tiun aŭtilon blublankan, ĝis kiam la patrino forigis min disde la fenestro kaj proksimigis mian kapon al ŝia brusto. Ŝajnis ke ĉi tiu pasaĝirportanto moviĝis tre malrapide, la sola moviĝanta surtere sen radoj, sed nur sur kelkaj rektaj reloj fiksitaj tiel forte al la tero.

Oni estis eniginta nin je centoj da personoj en la ties vagonoj, kie apenaŭ estis spaco por surmeti la piedon, por ne diri ke eĉ moviĝi de unu angulo al la alia. Oni aŭdis en ĝi ploradojn, kriojn, mallaŭdojn kaj kadukon de maljunulo, kiu, kiel oni diris nin pli poste, suferis pro astmo. Li mortis en la trajno ne pli ol dek minutojn post la ekiro. Por li verŝis larmotorentojn du junaj knabinoj, kiuj povus esti liaj nepinoj. Estis la unua fojo ke mi kunvojaĝis apud mortinta homo kaj la unua fojo ke mi vidis iun el kies maljuniĝinta korpo eliĝis la animo. La patrino kovris miajn okulojn por ke mi ne vidu tiun senvivan estajon, ĝiskiam du personoj prenis lin kaj sendis mi ne scias kie. Ĝiskiam ĉi tiu trajno, tiel rustiĝinta kaj fariĝinta kadukaĵo, tiel deinterne, kiel deekstere, moviĝis tiel malrapide por venigi nin kviete en la mondon kiun ni ne konis, mi rigardis de momenteto al momenteto tra la fenestro, kun espero ekrimarki ie la spurojn de iu portanto simila al la nia, kun kiu estas alvenonta la patro. Mi lacigis la patrinon per senĉesaj demandoj: kiam ekiros la trajno de la patro, ĉu ankaŭ en ĝi estos tiom multe da homoj kiel ĉe la nia, ĉu mortos iu povra maljunulo ankaŭ en ĝi. la samajn demandojn mi faris la tutan vojaĝon, aparte la unuan, min interesis scii precize la ekiran horon kaj la denovan renkontiĝtempon kun la patro.

La trajno finfine haltis kaj tre malpezigita, mi cerbumadis ke la sama ĉi trajno, ĉi tiu portanto de la

forpelitaj animoj, forigis nin disde nia mortoportanta lando, estas venigonta nin en landon, kie ni trovos angorokvietigon. Sed, la moviĝanta rustiĝinta ferulo estis venigonta nin en kotaĵita valo, ĉe kies flanko fluadis rivero pli malpura ol ĝi mem. Mi kaj la patrino, ŝovante niajn valizojn, kiujn ne pli ol du horojn antaŭe portadis la patro, malrapide eniris enen de ĝi, kiun la pluvo desupre en la ĉielo kaj la larso malsupre de la homo estis malsekiginta tiel multe kiel ĝi estis transformita en lokon kie malvarmumiĝis, de la kapo ĝis la piedoj, ĉiu espero de la ĵus eltrajniĝintoj. Dum kvin tagoj de nia restado tie, la suno apenaŭ vidis nin al la okuloj eĉ unu tagon, ne ĉar ĝi ne amis nin, sed ĉar ĝi estis lasinte la ĉielon plori por ni, dum ni preskaŭ ĉiutage ploris por si mem. Ni transformis en larmejon tiun vilaĝan valon, kiu, ŝajnis min, portis en sia abdomeno, aŭ pli bone diri sub ties ungegoj, preskaŭ ĉiujn urbohomojn kaj eble ankaŭ la homojn de la ĉirkaŭaj urboj. Mi ne povus imagi ke oni povus enmeti ĉiujn dupiedajn enspirulojn de la mia granda urbo en tiom malgranda loko. Kelkaj junaj knaboj, grim্পintaj sur remorkoj de traktoroj kaj kamionoj, pri kiuj oni diris ke estis alportitaj de iuj bonfaraj asocioj, alĵetis nin panbulojn kvazaŭ al vagabondaj hundoj, dum ni, kiel malsataj birdoj, akceptis ilin per la levitaj manoj, interŝovante kaj interpuŝante unu la alian. La plej potencaj povus pli multe interkubutiĝi, tiel ili sukcesis ricevi plej varmajn kaj plej molajn panbulojn, dum ni malpli fortaj estis kontentaj ricevi eĉ pli malvarmajn panbulojn. Mi memoras ke ambaŭ mi kaj la patrino ege malpuriĝis postkurante kamionon dissendanta plastajn kovrilojn, kiun pene ni certigis al ni, por ke ilin surmetu ie kaj konstrui rifuĝejon kontraŭ la subtilan pluvon senĉese enfalanta. En ĉi tiu aĉa loko, oni povus vidi nenion alian ol lacajn homojn spirite elĉerplitajn. Mia okulo vidis plorantajn infanojn, kurantajn virojn post la panbuloj kaj plastaj kovriloj, virinojn kaj junajn knabinojn brilperditaj kaj malĵunulojn kiuj ĵuris ke tian militon ili apenaŭ estis vidintaj antaŭe, nek estis travivintaj iam ajn. Oni povus diri ĉion, krom la belaĵojn, kiuj povus igi vin sentiĝi bone tie, malgraŭ la fakto ke nun supre de niaj kapoj ne plu estis la pugnoj kaj la automatikoj de la kalvaj kaj longharaj policistoj, grandmustakaj kaj

favulaj, obezaj kaj sveltaj, kaj multaj aliaj diversaj angoroportantoj, dirantaj la samajn vortojn al ni.

Malsame al la vojaĝo kun ĉi tiu malnova kaj malrapida trajno, kie unuafoje en mia vivo mi vidis mortantan homon, en ĉi tiu loko mi vidis unuafoje naskiĝantan estaĵon. Juna novedzino, troviĝanta ne pli ol dudek metrojn for de ni, naskis knabon. Ŝajnis min ke dum momenteto, en multaj vizaĝoj sentiĝis ĝojventeto, kiu tamen daŭris tre mallonge.

Ĝis kiam la kolono de la translokitoj tra la urbaj stratoj similis al senfina rivero, ĉi tiu valo similis al densa homa maro, kiu de momenteto al momenteto pleniĝis. Dum tiuj tagoj de nia restado tie, ĉiun matenon kaj ĉiun minuton mi tenis la kapon turnita al tiu valo. Angore mi atendis la sekvantan trajnon per kiu alvenus la patro. Nur tien mi direktis mian menson. Ĝi kontinue aldiris min la samajn vortojn, ke li venus nepre, ke li ne povus veni per tia trajno rustiĝinta kia la nia, ke por profesoroj oni difinis iun novan, kie estus nur kvieto, libroj kaj klasika muziko, kiun mia patro aŭskultis plezure. Sed, tiu trajno ne estis venanta. Iun tagmezon la patrino kaptis min permane kaj aldiris min ke ni devus foriri en alian lokon. Mi neniel volis ekiri. Mi volis atendi la trajnon de la patro, sed ŝi altiris min tiel perforte kaj potence, kion ŝi neniam faris, kaj malgraŭ mian neĉesantan ploradon, enigis min en ĉielkoloran buson, atendanta nin sur la strato supre de ni. Mi ne sciis kien ĝi kondukos nin. Eble en alian valon.

*Ĉefurbo de Kosovo

Enesperantigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

—◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇—

Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio
Retadreso: vejdo@163.com

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin
turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

—◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇—